# VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku v Mnichově Hradišti, pro členy kroužku a příznivce mezinárodního jazyka.
Odpovědný redaktor – MUDr. Josef Hradil, Mnichovo Hradiště 718
Cena – dobrovolný příspěvek
Povolil ONV MLADÁ BOLESLAV, odbor kultury 47/87-403/16

**MAJO 1989** Numero **2** Číslo **KVĚTEN 1989**

EN LA JARO 1989 FESTOS LA URBO MNICHOVO HRADIŠTĚ 710 JAROJ DE DAŬRO!

Historio de la urbo Mnichovo Hradiště (Prilaborita el la artikolo de s-ro L. Bobek)

Estas malmulte da pejzaĝoj en la mondo, kiuj gravuriĝas en menson de la homo, kiel la valo de rivero Jizera. Ĉiu peceto de ĉi tiu regiono „Ĉeĥa paradizo" estas markita de paŝoj de historio, de homa laboro kaj de historio memoraĵoj.
Kaj ĉi tie, en romantika regiono disvolviĝas kaj kreskas naskiĝurbo de la nacia heroo Jan Šverma. La urbo, kie naskiĝis kaj restadis ĉeĥaj renaskiĝaj artistoj kaj sciencistoj. La urbo hodiaŭ estas tra la tuta mondo konata per produktado de kamionoj LIAZ. La urbo kun fiera pasinteco kaj kreiva estanteco, estas la dua plej granda urbo de distrikto Mladá Boleslav.
La historio de la urbo kaj ĝia historia evoluo estas mallarĝe kunligita kun hodiaŭa vilaĝo Klášter – Hradiště s.Jiz; ĝin fondis jam en la 5-a jarcento slava gento de Ĥorvatoj, kiuj elkonstruis fortikaĵon ĉe rivero Jizera, kie kondukis grava komerca vojo de Danubo, trans Moravio ĝis Žitava en hodiaŭa GDR. Laŭlonge de ĉi tiu vojo estiĝadis komunumoj, kie ekloĝadis metiistoj.

V ROCE 1989 OSLAVÍ MĚSTO MNICHOVO HRADIŠTĚ 710 LET SVÉHO TRVÁNÍ!

Historie města Mnichovo Hradiště (Upraveno z článku pana L. Bobka)

Je málo krajin na světě, které se vryjí do mysli člověka tak hluboko, jako údolí řeky Jizery. Každý kousek tohoto kraje „Českého ráje" je zaznamenán kroky dějin, prací lidu a historickými památkami.
A zde, v romantickém kraji se rozvíjí a roste rodné město národního hrdiny Jana Švermy. Město, kde se zrodili a pobývali čeští obrozenečtí umělci a vědci. Město, dnes po celém světě známé výrobou nákladních automobilů LIAZ. Město s hrdou minulostí a tvořivou přítomností je druhým největším městem okresu Mladá Boleslav.
Historie města a jeho dějinný vývoj je úzce spjat s dnešní obcí Klášterem – Hradiště nad Jizerou, založenou již v 5. století slovanským kmenem Chorvátů, kteří vystavěli tvrz u řeky Jizery, kudy vedla důležitá obchodní cesta od Dunaje přes Moravu do Žitavy v dnešní NDR. Podél této cesty vznikaly osady, kde se usazovali řemeslníci.

Por estiĝo de Mnichovo Hradiště estas grava fiŝkaptista komunumo nome Rybitví, kiu malpli frue fariĝis la fundamento de urbeto Mnichovo Hradiště. Laŭ historiaj fontoj oni povas eble opinii, ke tiam servutula urbeto estis fondita en la j. 1279. Ĝi estas parto de la granda eklezia bieno de monaĥoj de ordeno cistorcianoj, kiu okupis sin pri kampa kaj arbara agrokulturo. Ĝi venis en ĉi tien regionon en la 11-a jarcento el Francujo. Klášter-Hradiště fariĝis en la j. 1420 akiraĵo de husanoj, kiuj ĝin forrabis kaj forbruligis. Soldataro de husanaj orfoj tenis monaĥejon, ĝis la batalo ĉe Lipany. Post ĉi tiu batalo ricevis Klášter-Hradiště kun la urbo Mnichovo Hradiště, kiel donacon perfida husana soldatestro Jan Čapek el Sány, de la imperiestro Zikmundo.

En la j. 1468 ruinigis la regionon armeo de germanaj kruckavaliroj dum militaekspedicio kontraŭ la ceĥa reĝo Georgo el Poděbrady.

Fine de la 16-jarcento akiris la urbon kaj monaĥejan bienon per geedziĝo Kriŝtofo Budovec el Budov. Post lia morto havaĵheredis Venceslao Budovec el Budov – lia nevo.

Li lasis dum la j. 1600-1606 rekonstrui malfrue gotikan fortikaĵon en renezancan kastelon. Li estis favoranto de Ĉeĥaj fratoj, kiuj en la urbo fondis kantgrupon Sion.

Post la fatala malvenko ĉe Bílá Hora (Blanka monto) en la j. 1620 estis lia havaĵo konfiskita kaj donacita al la grafo Valdštejn. Budovec kiel unu el 27 ĉeĥaj nobeloj kaj urbanoj estis ekzekutita sur Staroměstské náměstí (Malnovurba placo) en Praha, en la j. 1621.

Eĉ tridekjara milito ne evitis Mnichovo Hradiště. En la majo de la j. 1643 estis la urbo denove forbruligita per svedaj soldatoj. Kaj post ĉi tiu katastrofo – el cindro kaj ruinoj – elkreskis la nova urbo, kies iuj konstruaĵoj estas ĝis nun konservitaj.

Krom la preĝejo de sankta Jakobo el la jaro 1384 (kiu estis kelkfoje rekonstruita), estis konstruita kontraŭ la kastelo la preĝejo de s. Tri reĝoj en la j. 1659 kaj kapucena monaĥejo en la j. 1690. En la kapelo de s. Anna el ja j. 1724 oni metis korprestaĵojn de la fama armestro Adaberto el Valdštejn.

Pro vznik Mnichova Hradiště je důležitá rybářská osada jménem Rybitví, která se stala později základem městečka Mnichovo Hradiště. Podle historických pramenů lze soudit, že tehdy poddanské městečko bylo založeno v roce 1279. Bylo součástí velkého církevního panství mnichů, řádu cisterciáků, který se zabýval polním a lesním hospodářstvím. Přišel do zdejšího kraje ve století jedenáctém z Francie. Klášter-Hradiště se stal v roce 1420 kořistí husitů, kteří jej vyplenili a vypálili. Vojska husitských sirotků držela Klášter až do bitvy u Lipan. Po této bitvě dostal Klášter- Hradiště i s městem Mnichovým Hradištěm jako dar zrádný husitský hejtman Jan Čapek ze Sán od císaře Zikmunda.

V roce 1468 pustošila kraj vojska německých křižáků na válečné výpravě proti českému králi Jiřímu z Poděbrad.

Koncem 16. století získal město a klášterské panství sňatkem Kryštof Budovec z Budova. Po jeho smrti zdědil majetek Václav Budovec z Budova – jeho synovec.

Nechal v létech 1600-1606 přestavět pozdně gotickou tvrz na renesanční zámek. Byl příznivcem Českých bratří, kteří ve měst+ založili pěvecký sbor Sion.

Po porážce na Bílé Hoře roku 1620 byl jeho majetek konfiskován a darován hraběti Valdštejnovi. Budovec byl jako jeden ze sedmadvaceti českých pánů a měšťanů popraven na Staroměstském náměstí v Praze v roce 1621.

Ani třicetiletá válka se Mnichovu Hradiště nevyhnula. V květnu roku 1643 bylo město opět vypáleno švédskými vojáky. I po této katastrofě z popela a trosek vyrostlo město nové, jehož některé budovy jsou zachovány dodnes.

Kromě chrámu svatého Jakuba z roku 1384 (několikrát přestavovaného) byl proti zámku postaven kostel sv. Tří králů v roce 1659 a kapucínský klášter v roce 1690. V kapli svaté Anny z roku 1724 byly uloženy ostatky slavného vojevůdce Albrechta z Valdštejna.

La 18-a jarcento estis en signo de evoluado de metioj. Ekestas burĝaj domoj, en la urbon translokiĝas oficejoj. Estiĝas manufakturoj, metiejoj kaj fabrikoj, speciale dum la 30-aj – 40-aj de la 19-a jarcento.
Kun kreskado de laboristaro kreskas malkontento kaj rezisto kontraŭ reganta kapitalismo. (Komencoj de la laborista movado)
En la jaro 1833 enskribiĝis la kastelo en Mnichovo Hradiště en la tutmondan historion per rendevuo de tri regantoj – imperiestro de Aŭstrujo Francisko I-a, caro de Rusujo Nikolao I-a kaj princo de Prusujo Frederiko Vilhelmo. Ĉi tie ili pridiskutis eŭropajn politikajn problemojn. Mnichovo Hradiště havis 350 domojn kaj proksimume 3000 loĝantojn. Tiam en la urbo estiĝis du malgrandajn teksfabrikoj kun cento da laboristoj. Venadas periodo de revolucia bolado, ekestas maltrankviloj.
Multsignife aktivis ĉi-tia samurbano Emanuelo Arnold „danĝera slava propagandisto“. En revolucia jaro 1848 li migrada tra la kamparo, agitadas por konkordo de Ĉeĥoj, por nacia memstareco kaj plibonigo de cirkonstantoj de la laboristaro.
Lia frato Jan Arnold estis renaskiĝa pastoro. Li estis tiu, kiu la 12-an de junio de la j. 1848 en Koňský trh (Ĉevala foiro-/nun Venceslaa placo) en Praha celebris memorindan slovan kampmeson. La dua duono de 19-a jarcento estis markita de la milito Prusujo-Aŭstrujo, kiu tuŝis eĉ ĉirkaŭaĵon de la urbo. Pri tio atestas multnombraj monumentoj ekz. sur monteto Mužský, kie en la j. 1869 kaj 1900 okazis grandaj kontraaŭstruaj popolkunvenoj.
Komence de la 20-a jarcento staris en frunto de la urbo JUDr-o Šverma – progresa urbestro – la patro de la nacia heroo Jan Šverma.
La unua mondmilito en la jaroj 1914-1918 trankvilan vivon de la urbo multe ĝenis. En la 14-a de oktobro 1918 manifestis sur la placo granda homamaso kaj postulis finiĝon de la milito kaj memstarecon por la ĉeĥa nacio.

18. století bylo ve znamení vývoje řemesel. Vznikají měšťanské domy, do města se stěhují úřady. Vznikají manufaktury, dílny i továrny, zvláště ve třicátých a čtyřicátých letech devatenáctého století.
S růstem dělnictva roste i nespokojenost a odpor proti vládnoucímu kapitalismu. (Počátky dělnického hnutí)
V roce 1833 se zapsal zámek v Mnichově Hradišti do světových dějin schůzkou tří panovníků – císaře rakouského Františka I., ruského cara Mikuláše I. a pruského prince Bedřicha Viléma. Zde projednali evropské politické problémy. Mnichovo Hradiště mělo 350 domů a asi 3000 obyvatel. Tehdy ve městě vznikly dvě malé textilní továrny se stovkou dělníků. Přichází období revolučního kvasu, vznikají nepokoje.
Významně se uplatnil zdejší rodák Emanuel Arnold „nebezpečný slovanský propagátor“. V revolučním roce 1848 putuje po venkově, agituje za svornost Čechů, za národní samostatnost a zlepšení poměrů dělnictva.
Jeho bratr Jan Arnold byl buditelským knězem. To on sloužil 12. června 1848 na Koňském trhu (nyní Václavské náměstí) v Praze památnou slovanskou polní mši. Druhá polovina 19. století byla poznamenána prusko-rakouskou válkou, která se dotkla i okolí města. O tom svědčí četné pomníčky, např. na hoře Mužský, kde se v roce 1869 a 1900 konaly velké protirakouské tábory lidu.
Počátkem 20. století stál v čele města JUDr. Šverma – pokrokový starosta – otec národního hrdiny Jana Švermy.
První světová válka v letech 1914-1918 pokojný život města velice narušila. 14. října 1918 manifestovalo na náměstí obrovské množství lidu a požadovali ukončení války a samostatnost pro český národ.

Deziro de la popolo efektiviĝis la28-an de oktobro 1918 per estiĝo de la Ĉeĥoslovaka ŝtato.
Dudekaj jaroj estis plenigitaj pere de batalado por laborrajtoj. Terkulturlaboristoj de la bienoj en Hněvousice, Přestavlky kaj Pachouř, kune kun la laboristoj de la sukerfabriko klopodis pri preno la bienoj en siaj manojn.
En junio de la j. 1921 estis fondita dum kunveno en la gastejo „Na skalce“ (Sur roketo) loka organizo de KSĈ. En tiu ĉi tempo terkulturaj laboristoj fondis unuan agrokulturan kooperativon en Hněvousice. En la urbo estiĝis nova ŝufabriko (hodiaŭ Purigejo de vestoj), vitrofarejo (hodiaŭ Unueca kooperativa magazeno), teksfabriko Mniĉhoteks (hodiaŭ Severka).
Ekonomia krizo en la 30-aj jaroj kaj kresko de faŝismo estis simptomoj de la nova milita konflikto. Tuj post perfida Minĥeno en la j. 1938, post anekso de Sudetlando al t.m. Tria Regno fariĝis Mnichovo Hradiště limregiona urbo.
Komencis perzekutado de patriotoj kaj rezist-movadanoj. En naziaj koncentrejoj perdis la vivon 26 civitanoj de la urbo. Tamen kun la helpo de la civitanoj funkciis en ĉirkaŭaĵo de la urbo soveta raport-grupo de la majoro Chranovský „Lupo“. Ankaŭ la lasta ofero de la dua mondmilito estis ĝia membro Feďa Solovjev, kiu estis mortpafita la 9-an de majo 1945 ĉe Bílá Hlína (Blanka Argilo).
Ja la 5-a de majo 1945 transprenis povon en la urbo, ĝis tiutempe nelega nacia komitato. Je la 10-a de majo 1945 estis Mnichovo Hradiště liberigita pere de la Sovetarmeo.
Nur post la februara venko de la laborpopolo en la j. 1948 estas eble realigi „Koŝican registaran programon“, naciigi fabrikojn, bankojn, minejojn, aliri al kolektivigo de agrokulturo; estiĝis ŝtataj bienoj kaj Unuecaj agrokulturaj kooperativoj (UAK), plialtiĝas industria produktado.
Ĝia prezentanto fariĝis LIAZ per produktado de kamionoj, „Severka“ per produktado de infankonfekcioj, Fruta per produktado de fruktmostoj kaj sukoj. Estis konstruita la moderna lernejo, kanalizo, kinejo, infanĝardeno, novaj setlejoj en la strato Lidická, Za sokolovnou, V cestkách, memservaj vendejoj, gimnastikejo ktp. La civitanoj ekkonis, ke la balotprogramo de urbokonstruado plenumiĝas, ke oni vivas pli bone kaj pli ĝoje.
ESPERANTIGIS ZDENĚK VÍDEŇSKÝ

Přání lidu se uskutečnilo 28. října 1918 vznikem Československého státu.
Dvacátá léta byla naplněna bojem za práva pracujících. Zemědělští dělníci statků v Hněvousicích, Přestavlkách a Pachouni, společně s dělníky cukrovaru usilovali o převzetí statků do svých rukou.
V červnu 1921 byla založena v hostinci „Na skalce“ místní organizace KSČ. V té době zemědělští dělníci založili první zemědělské družstvo v Hněvousicích. Ve městě vznikla nová továrna na obuv (dnes Čistírna oděvů), sklárna (dnes sklad Jednoty), textilní závod Mnichotex (dnes Severka).
Hospodářská krize ve 30. letech a růst fašismu byly příznaky nového válečného konfliktu. Hned po zrádném Mnichovu 1938, po připojení Sudet k tzv. Třetí říši, stává se Mnichovo Hradiště pohraničním městem.
Začalo pronásledování vlastenců a odbojových pracovníků. V nacistických koncentračních táborech a na popravištích přišlo o život 26 občanů města. Přesto za pomoci občanů působila v okolí města sovětská zpravodajská skupina majora Chranovského „Vlka“ Také poslední obětí druhé světové války byl její člen Feďa Solovjev, který padl 9. května 1945 u Bílé Hlíny.
5. května 1945 převzal moc ve městě, do té doby ilegální národní výbor. 10. května 1945 bylo Mnichovo Hradiště osvobozeno Sovětskou armádou.
Teprve po únorovém vítězství pracujícího lidu v roce 1948 je možné realizovat „Košický vládní program“, znárodnit továrny, banky, doly, přistoupit ke kolektivizaci zemědělství; vznikly státní statky a Jednotná zemědělská družstva (JZD), zvyšuje se průmyslová výroba.
Jejím představitelem se stal LIAZ s výrobou nákladních automobilů, „Severka“ výrobou dětské konfekce, Fruta s výrobou ovocných moštů a šťáv. Byla postavena moderní škola, kanalizace, kino, mateřská škola, nová sídliště v Lidické ulici, Za sokolovnou, V cestkách, samoobsluhy, posilovna atd. Občané poznali, že volební programy budování města se plní, že se žije stále lépe a radostněji.

KOREKTIS KAREL BLAŽEK

Esperantistaj renkontiĝoj en Slovakio 1989: (elekto) Numero de renkontiĝo:
89.19.: kvaronjaraj renkontiĝoj de la frekventantoj de korespondaj kursoj:
tritagaj: 3.-5.III.; 26.-28.V.; 22.-24.IX; 10.-12.XI.1989 en Poprad – Somera esperanto lernejo en Poprad, 3 etapoj: 2.-15.7.; 16.-29.7.; 30.7.-12.8.89 kursoj ABC en la asocia domo.
Turisma semajno en Slovaka paradizo kampadejo Tatran apud Spišská Nová Ves 15.-21.7.89 informoj Peter Pavuk, Jilemnického 17, 05201 Spišská Nová Ves. - Aranĝo numero 8909 : PERAT printempo esp. renkontiĝo en Altaj Tatroj 6.-9.5.89 en Poprad, asocia domo. - 89.12: Ŝak-turneo en Žilina, 5.+6.VIII. informoj Miroslav Salát, 02341 Nesluŝa 805. - 89.13 Turismaj tagoj en Žilina 29.VII.-4.VIII. inf.: Ing Juraj Gondžúr, Levočská 3, 01008 Žilina. - 89.15 renkontiĝo de esperantistoj-mikologoj en Poprad 15.-17.09 – Sendeviza turisma interŝanĝo kun MLR, PLR, NDR, SSSR, HLR 3.-12 tagoj entute nur 200 personoj, membroj de EA. - Intensiva kurso de Eo – 120 instruhoroj 9– unufoje jare – inf. SEA (89.21). Informojn, eventuale detalan planon de la renkontiĝoj sendas SEA (Slovenský esperantský zväz, Sobotské nám, 05801 Poprad.
Ĝi sendos al vi ankaŭ sian libropoponon (Bildvortaro 25.- Kčs, Tvarožek – základy Ea 10.-; Metodiko kaj praktiko (pri instrumetodoj) 39.- Kčs; Baza legolibro por komencantoj 33.-; Meze de Eŭropo-historio de ČSSR-konvena donaco por eksterlanda amiko 15.-; insignoj, afiŝoj, sonbendoj. Skribu al SEA pri libropropono!

AKADEMIO INTERNACIA de la SCIENCOJ SAN MARINO invitas progresintajn esperantistojn al la universitata sesio, kiu okazos de 15 ĝis 28 majo 1989 en Krynica. Vi komencos plenrajtan universitatan studadon kaj povas sinsekve atingi titolon de bakalaŭro, magistro, doktoro aŭ doktoro habilitita dela Internacia lingvo. Prezo 2400 Kčs. Aliĝiloj: mag.inĝ Jan Talik, ul. Sloneczna 19/57 PL 32-050 SKAWINA.

Viena radio proponas kelkajn interesajn publikaĵojn senpage. El propagandaj kaŭzoj tamen ĝi postulas, ke la mendanto sendu mendojn sur bildkartoj diversspecajn en minimuma semajna intervalo (poŝtmarko 2,50) memkompreneble esperante skribitajn:

Vídeňské radio nabízí zdarma několik zajímavých publikací. Z propagačních důvodů však požaduje, aby objednávající poslal objednávky na pohlednicích v nejméně týdenním intervalu (poštovní známka 2,50 Kčs) samozřejmě v esperantu:

Esperanto en Viena Radio – 2 mendiloj
Superrigardo pri Aŭstrio, 1.a parto, ilustrita – 4 mendiloj
Superrigardo pri Aŭstrio, 2.a parto – 3 mendiloj
La mondo en la jaro 1887 ilustrita – 3 mendiloj
Aŭstria ŝtatprezidanto Franz Jonas kiel esperantisto – 1 mendilo
Kolekto de Kvin artikoloj pri Beethowen-memorlokoj en Vieno – 2 mendiloj
Porinfanaj poemoj de E.Lippe (4 paĝoj) – 1 mendilo.

Ĉiun mendilon sendu aparte
Každou objednávku pošlete zvláště
Adreso: ESPERANTO-REDAKCIO de ORF, Würzburggasse 30, A-1136 Aŭstrio.

Ĉeĥa esperanto-asocio anoncas novajn vendohorojn (prodejní dobu)
lunde-vendrede 9-17, ĉiun 1.an kaj 3.an sabato en la monato 9-13h.
Novaĵo (novinka): Ĉiam malnova (rakontoj pri Prago) 19 Kčs. - Medailo de L.L.Zamenhof – tombako – de akad.skulptisto (sochař) J.Harcuba 130 Kčs.

Anonce (insert) en Heroldo estas mendebla ĉe ĈEA Praha. Ĉiuj komencitaj 25 vortoj 100 Kčs. La teksto devas esti klara, lingve senerara, klara adreso. Indiku numeron de via membro-legitimilo (servo nur por membroj de Ĉeĥa esperanta-asocio.
Šimánek Frant. 29301 Ml. Boleslav, Lidových milicí 1132/III-solenos la 26an de junio sian 90 jaran naskiĝdatan! Gratulu lin! Ĝojigu lin!

ZK ROH Tesla Pardubice, esperantista rondeto – esperantský kroužek – proponas al siaj membroj kaj favorantoj (příebalta esperantaznivcům) partoprenon en:

20.-26.5. Ĉebalta esperanta printempo en Mielno PL kun turisma kaj kultura programo, kiu estadas (bývá) finance favora. Inviton certigas la EK

23.-30.6. Renkontiĝo en Lepizigo okaze la terkulturista ekspozicio

15.-24.7. IREN - renkontiĝo de naturamikoj en Abaliget-kompleta loĝado, manĝado, ekskursoj 3500 ft

30.7.-6.8. Postupim DDR POSET – loĝado en studenta ĥejmo en ĉambroj po 3 ĝis 5 personoj – nur por parolantaj esperanton-ekskursoj, naĝado-ŝip-veturado- dunomaĝado – 190 DM

Informoj ĉe la klubo Tesla Pardubice.

Rezultoj de Tradukaj taskoj ĉe s-ano Zdeněk Řezáč, Tanvald, Vítězná 355:
Nunsezone partoprenas 33 esperantistoj. Ĉeĥlingven tradukas 14 personoj, progresintaj tradukas el la ĉeĥa eperantlingven 19 personoj. Ni gratulas al persistema samideano Řezáč!
Výsledky Překladových úloh s-ana Zdeňka Řezáče, Tanvald, Vítězná 355:
Nyní se účastní 33 esperantistů. Do češtiny překládá 14 osob, pokročilí překládají z češtiny do Esperanta – 19 osob. Blahopřeme vytrvalému s-anu Řezáčovi.

ESPERANTOTUR, = asocio por faciligo (usnadnění) de la internacia turismo per la aplikado (užitím) de Esperanto, la plej granda esperanta turisma organizaĵo (centralo en Bydgoszcz, str. Marie Sklodowskiej-Curie) peris (zprostředkovala) en la j. 1988 turismajn ekskursojn por 9187 personoj. Entute ĝi gajnis 137000000 zl., kiuj la organizo uzos por konstruo de Esperanto-hotelo en Bydgoszcz kun oficejaj ĉambroj kaj 32 litoj por turistoj. ESPERANTOTUR proponas por la j.1989 419 ekskursojn kaj restadojn en landoj de la tuta Eŭropo. Se vi skribos, ĝi sendos liston da ekskursoj al vi. Oni povas pagi pere (prostřednictvím) de la peranto. Inĝ Milan Zvara, prezidanto de la Slovakia Esperanto-asocio en Poprad.

Deklaron de la honora patrona komitato de Universala Esperanto Asocio alvokantan (vyzývající) registrarojn kaj kompetentulojn de ĉiuj landoj por ke ili ebligu enkondukon (zavedení) de Eo en lernejojn, subskribis 45 elstaraj esperantistoj, inter ili Ralph Harry, estinta anstataŭanto (zástupce) de Aŭstralio en UNO (=OSN), Ingemund Bengsson, prezidanto de la sveda parlamento, William Drees, estinta nederlanda ĉefo de la registaro, Chen Yuan, direktoro de la instituto por aplikigita lingvistiko ĉe la ĉina akademio de sciencoj k.a. (=kaj aliaj).

Inter la tagoj 10.-16.8.1988 okazis (byla uspořádána) en Pekino internacia konferenco pri tekniko kaj scienco en Esperanto. Partoprenis 1400 sciencistoj-esperantistoj el 25 landoj. Estonta tia konferenco estos organizita inter la tagoj 25.-30.5.1990 denove en Pekino.
Tutmonda adresaro de esperantistoj-kolektantoj (sběratelé) estos eldonita de Ĉina Changsha Esperanta Filatelisto-Ligo. En ĈSSR aliĝilojn kolektas Miroslav Ĉegan, Vietnamská 1488, 70800 Ostrava-Poruba.

Post kvinajara klopodo (úsilí) estis fondita Unuiĝo Togolanda por Esperanto B.P. 12035 Lomé, Togo-lando, Afriko. Instigu, sendu gazetojn donace, petu adresojn por korespondado.
Printempa paca renkontiĝo en Jablonec nN okazos la 22an de aprilo 1989, restoracio sur altaĵo Petřín je suda rando de la urbo. Vi povas veni el diversaj direktoj eĉ piede inter la 9-a kaj 15a horo. Ek de la 15a horo komenciĝa oficiala programo, poste dancvespero en esp.klubejo-Kulturcentro, strato U balvanu 2. Ĉiuj ricevos memoremblemon kaj diplomon pri atingitaj kilometroj. Kotizo 5 Kčs, infanoj 2.- Kčs. Tranokteblo post interkonsento kun Esperanto-p.schr. 190, 46621 Jablonec nN

EK MH 125/89

Novaj finstudintoj de la baza koresponda kurso:

Zimek Alois
Švelchová Irena
Mlejnek Václav
Hruška Ladislav
Pirhala Miroslav
Voráčkova Libuše
Strakušová Marie
Šebekova Ludmila
Cacáková Lenka
Svobodová Jana
Skovajsa Zdeněk

Ni gratulas al ili kaj deziras plenan sukceson en ilia privata kar pormovada vivo!
Blahopřejeme a přejeme jim plný úspěch v jejich soukromé a esperantském životě!

LENTAIGNE: KIEL DIRI? Praktika Esperanta frazeologio: (Daŭrigo-pokračování)
Fidu la Providencon (prozřetelnost). Rekomendi paciencon. Ne perdu la esperon. Kie estas sufero, tie ankaŭ estas espero. Gardi esperon. Nura la espero tenas lin vivanta (drží ho při životě) Pala lumradio, lumstrio de espero (paprsek naděje). Fajrero (jiskra) da espero. Estas nenia motivo por malesperi. Nutri, dorloti (hýčkat), flegi belan esperon. Luliĝi (kolébat se) en ia espero. Mi esperas, ke vi min helpos. Tio estis iluzia, efemera, kaduka espero. Maldolĉa sento de neplenumita espero. La espero cedis (ustoupila, postoupila) lokon al plena disreviĝo (vystřízlivění). Revo=sen). Lia espero montriĝis trompa (zklamaná). Esti trompita en siaj esperoj. Enabismiĝi (= sinki sin en abismon). Resigni pri ĉiuj esperoj. Liaj esperoj disfalis en la abismon. Diri adiaŭ al siaj lastaj esperoj. Estingiĝis (vyhasla) ŝia lasta espero. Li melankolie rigardis la ruiniĝon de siaj lastaj esperoj. La fortunu (štěstěna) sin turnis kontraŭ li, lin forlasis, perfidis (zradila). Cedi, fordoni sin al ĉagreno, al tristo. Droni en tristeco. Konsumiĝi de tristo. Frunto ombrata de malgajaj pensoj. Ombraj tagoj. Tre aflitita, deprimita. Deprimo (=depresio). Maltrankvilo, anksieco (úzkost), angoro: tri gradoj de la sama stato. Troviĝi en prema, ekstrema situacio, sen eliro, pli kaj pli neelportebla. Mizero sur mizero. El pluvo en riveron. El sitelo en barelon. El fajro sub flamon. Estu kiel estos. Mizero instruas, hardigas la korojn. Instruita de la malfeliĉo, de la malriĉeco. Laboro asekuras kontraŭ mizero. Serĉi konsolon en preĝo. Preni sian sorton en propraj manoj. Pistu (drtit) triston, ŝutu ĝin en venton. Forĵetu la malĝojon.

KORESPONDI DEZIRAS: (adresoj elektitaj el la plej freŝaj esp. gazetoj pliparte, aŭ rekte senditaj). Kondiĉo por sukcesa ligo de korespondado: nepre skribi almenaŭ la unuan leteron sen gramatikaj eraroj. En frazoj evitu nacilingvismojn! Mallongiloj: bk=bildkartoj; ĉl=ĉiuj lando; ĉt=ĉiu temo; d=deziras; iŝ=interŝanĝas; its=interesiĝas; jj=;jaroj; kol=kolektas; k=korespondi; m=muziko; pm=poŝtmarkoj; s-ro=sinjoro; tm= tuta mondo.
Rasjakas Alexandr.V., Murmansk, prospekt Lenina 10/kv26, 58 jj, ekinĝeniero de aviadilaro d kor ĉt ĉl. Lia klubo en Murmansk daŭre serĉas novajn korepondamikojn.
MARTYNIAK Anna, Krakow, ul. Sliczna 12/12, flegistino d kor tm pri ĉt.
Lu Qiongyan, Erke Renmin Yiyaun, Jingxi, Guangxi, Ĉinio, 24j fraŭlino, laborantino en hospitalo, ĉt, tm, kol pm, itŝ librojn.
S-ro Li Guanghui, 363804 Xinxu Gongxiaoshe, Hua-an, Fujian, Ĉinio, 44j, vicdirektoro de Esp. sekcio pri scienco kaj tekniko itŝ informojn pri internacia komerco kaj E-libroj, bk, pm, fotoj.

Zhou Yuanlan, Di Yi Zhongxue, Nanzhang, Hubei, Ĉinio, 29j instruistino de angla lingvo, dez k pri tradukado, itŝ E-libron, kol pm, bk.
Geesperantistoj el Internacia klubo Esperanto, P.O.Box 76, 703000 Samarkand, Uzbekistan, USSR dez kor pri ĉl.
VITAL Sergio, Rua Deocleciano Faria, 184 pedra Azul, 39970 MG, Brazilo, 28j itŝ pri bk, pm kaj fremdaj lingvoj, tm.
Ĉu vi konas Mazdaĵetojn? Ĉu vi konas urbon Olŝtinon. Se ne, mi invitas vin viziti min. S-ro Marian Zdankonwski, Pana Tadeusza 15/69, PL, 10-46101 Olsztyn.
COLIINO Manfredo, D-7150 Becknang, Karlsbaderstr 7, 37j, pri ĉt kun ĉl
FRUKACZ Iwona, ul.Drzewna 58, PL 42-280 Czestochowa, 18j lernantino pri literaturo kaj fremdaj lingvoj.
Esperanto salono, Koresponda rondo, Guangdong Guangzhou-a Esp. Asocio, Xisheng st., Xiatang, Xiaobei, huanshi-zhonglu, guangzhou, Ĉinio, multaj komencantoj dez k kun tm.
Instruistoj de la lernejo por mensdebilaj infanoj dez kontakti lernejon de sama karaktero. Skribu al Li Yudong, 26, 26 Andingli, Xiaowangzhuang Habeiqu, 30021 Tianjin, Xaiaobei, Ĉinio.
Geesperantista Servo Geedziĝa, helpas fondi internaciajn esp.familiojn. Sendu 3 fotojn kaj viroj 10 internaciajn respondkuponojn, virinoj senpage. GSG, Fotoklubo, kesto 175, poŝtamt Minsk, 220050, USSR.
DIREKTA serĉas korespondparnerojn por hungaraj samideanoj. DIREKTA, Internacia Leteramika servo, Ozd-1, Poŝtkesto 39, 3601 Hungario.
Membroj de Petrozavodska Esperanto klubo „Norda Diano“ USSR 185680, Karela ASSR, Petrozavodsk, ul. Zajceva, d.47, Dom Kulturi Stroitelej d kor tm ĉt.
OLIVATO Jose Archangelo, Str.Carlos Augusto Menteiro de Barros 608, Santa R.P.Quatro cep 13670, San Paulo, Brazilo 22j komencanto tm itŝ bk, ĉt.
Ahmed Kavazoviĉ, Jelovĉe Selo, YU 7657 Donja Medidja, Gradaĉac, 38j, fraŭlo dez kor tm kun modestaj fraŭlinoj, kiuj deziregus krei Esperantan familion.
Interesoj: islamo, literaturo, filozofio, naturo, skiado, vojaĝoj kp. MACHALO Mariane, Rua Mapendi, 203-Rio de Janeiro, BR-22700, brazila fraŭlino dez korespondi pri ĉt.

xmxmxmxmxmxmxmx
xmxmxmxmxmx
xmxmxmxmx
xmxmxmx
xmxmx
xmx
x

Esperantský klub
29501 Mnichovo Hradiště

Otevřená listovní zásilka
Imprimé 50%
Presaĵo

EK MH 127/89